## La Redaktoro

Kontribuaĵojn sendu papere (prefere maŝinskribite), aŭ en elektronika formato al la redaktoro:
Poŝte:

Johan KÖHLER
P.O. Box 245
WINKLESPRUIT
4145
Respubliko de Sud-afriko

Retpoŝte: kohlerj@webmail.co.za

Ĉi tiu revuo iras al la membroj de la Esperanto-Asocio de Suda Afriko (EASA). Interŝanĝe por aliaj revuoj, ĝi estas havebla de la kasisto. Ne-membroj povas aboni, skribante rekte al la kasisto.

S-ro C. Beckford
43 Fairview Crescent
MILNERTON RIDGE
7441
Respubliko de Sud-Afriko

# Enhavo

Finfine!......................................................................................................... 3
Ludkartoj ....................................................................................................... 4
Postrestite....................................................................................................... 7
Dek kialoj por vojaĝi al Kaburbo.................................................................. 8
3a Sudafrika Subkontinenta Kongreseto....................................................... 10
Anekdotojn.................................................................................................... 13
Vojaĝo al Londono....................................................................................... 15
El Vikipedio ................................................................................................. 19

### Redaktore

# Finfine!

Jen preskaŭ estas la fino de la jaro 2005! Kia interesa kaj plena jaro estis por mi. Mi esperas, ke vi povas diri same. En tiu ĉi numero vi trovos iom malpli da artikoloj ol kutime, ĉefe pro manko de kontribuoj, sed ankaŭ pro tempopremo. Mi sincere pardonpetas al ĉiuj niaj legantoj pro la prokrasto. Por ne prokrasti pli, mi simple deziros al al ĉiuj benitan festotemon, kaj prosperan 2006. Kaj... bonan legadon!

Johan KÖHLER

# Ludkartoj

*Dum mia vojaĝo al Britio, mia gastiganto Philip donacis al mi ludkartaron alfabetan, petante ke mi elpensu Esperanto-ludon pere de ĝi. La angla lingva ludo, kiun oni povas ludi per tiuj kartoj estas "Kan-u-go". La reguloj de tiu ludo estas tre simplaj, kaj mi klopodos klarigi ilin al vi.*

**Johan KÖHLER**

## La kartoj

La kartaro konsistas el 60 kartoj. Sur unu flanko oni printis grandan literon (ripetita en du anguloj), kaj malgrandan ciferon en la du aliaj anguloj. La cifero estas la poentovaloron de la karto.

## Disdonado

Du ĝis sep homoj povas ludi je unu kartaro. La ludantoj elektu inter si disdonanto, kiu disdonu al ĉiu homo jenan nombro da kartoj:
2 ludantoj – 12 kartoj por ĉiu, 3 ludantoj – 11 kartoj por ĉiu ktp. ĝis 7 ludantoj – 7 kartoj.

Metu la aliajn kartojn kun bildoj surtable. Tio estas la "stokstako". La supran karton metu apude, bildo supre – tio estas la "ĵetstako".

## Ludo

La ludanto maldekstre de la disdonanto ludas unuavice: li metas vorton de 2-4 literojn sur la centro de la tablo. (se ludas 6 aŭ 7, faru vorton de ne pli da 3 literoj).

La ludo daurigas laŭvice (maldekstren). Ĉiu homo almetu 1-4 literojn al la vorto(j) jam surtable. Oni povas almeti literojn supre, malsupre, supre kaj malsupre, dekstre aŭ maldekstre, aŭ ambaŭflanke, kiel krucvortenigmo.

Se homo ne povas fari vorton el la literoj en lia mano, li licas preni la supran karton de aŭ la "stokstako" aŭ "ĵetstako", sed tiukaze devas ĵeti unu karton kaj li ne licas meti vorton surtable ĝis la posta ludvico. Ludantoj ne

estas permesata interŝanĝi kartojn.

## Pluraloj

Oni ne povas meti pluralojn, escepte de du kazoj:

### *Unua escepto*

Se la j, kiu formas pluralon el vorto jam surtable estas la komenca litero de nova malplurala vorto.

### *Dua escepto*

Se la ***j*** jam estas parto de vorto surtable, vi povas uzi ĝin kiel finiĝo de pluralo.

## Liberaj kartoj

Du liberaj kartoj estas en la kartaro. Tiujn kartojn oni retenu en la mano ĝis la lasta literkarto estas metita. Post tiu, la liberaj kartoj estas ĵetitaj, kaj la ludanto gajnis. Tiu signifas, ke la literaj kartoj ne partoprenas en la ludo – oni ne povas fari per ili vortojn. Kaze ke ludanto prenas liberan karton de la "stoko", li ne povas ĝin ĵeti ĝis la venonta vico.

## Esperantigo

Tiu ĉi ludo povas funkcii en iu ajn lingvo, kaj ja ne nur per kartoj – estas ankaŭ speco de skrablo, ĉu ne? Tamen, se vi hazarde havas similajn kartojn, kompreneble la Esperantaj ĉapelitaj literoj ne ekzistos en la angla kartaro. Mi havas du sugestojn. Unue: Oni povas komence elekti, ke ĉiu litero [ĉ, ĵ, ĥ, ŝ, ĵ, ŭ] (la ĉapeligeblaj literoj) povas esti kaj ĉapelita, kaj ne, laŭ bezono – sen ia ajn alia indiko. Tio iom plimultigas la eblecojn de vortfarado. Due, se vi ŝatas iom pli malfacila ludo, vi povas uzi ion, ekz. butonojn aŭ monerojn por indiki ĉapelon sur karto. La preciza loko de la indikilo ne gravas. Tiel ĉapelita litero restas ĉiam ĉapelita.

Ne-Esperantaj literoj (WXY) oni povas aŭ forpreni, aŭ uzi kiel specialaj kartoj. Specialaj kartoj povas preni lokon de iu ajn litero. Simple metu la karto kun la bildo surtable. Oni ne permesas interŝanĝi ĝin poste kun literkarto, kaj ĝia donita litervaloro restu ĉiam senŝanĝe.

Pro manko de literoj "o", estas permesata meti nur radikojn de

substantivojn. Tamen, ne estas permesata fari nekompletajn verbojn, adjektivojn, adverbojn ktp.

## Grave


Se du aŭ pli da literoj troviĝos unu horizontale aŭ vertikale, ili devas formi korektajn vortojn en ambaŭ direktoj. (vidu bildon) Oni povas aldoni kartojn en unu direkto, por ĉiu vico. Kiam karto estas surtable, oni ne povas depreni aŭ interŝanĝi ĝin. Oni povas "ataki" nur unu punkto de la krucvorto – vidu bildon.

## Poentoj

La ludo finiĝas kiam ludanto ne plu havas kartojn en la mano. Por la aliaj ludantoj, oni kalkulas poentsumon laŭ la ciferoj de la restantaj kartoj. Tiu, kiu havas plej malgranda sumo, viktoras.

| | | | | | | | | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| A - 4 | B - 2 | C - 2 | D - 3 | E - 4 | F - 2 | G - 2 | H - 3 | I - 3 | J - 1 | K - 2 | L - 2 | M - 2 |
| N - 2 | O - 3 | P - 2 | Q - 1 | R - 3 | S - 3 | T - 3 | U - 3 | V - 1 | W - 2 | X - 1 | Y - 1 | Z - 1 |

Table 1: Poentoj de la literoj en la Angla versio




***Supre:*** *La ludo post kelkaj vicoj*

**Loke**

# Postrestite

*Ĉu vi sciis, ke la 14a de Oktobro 2005 estis Monda Tago de Normoj?*

**Axel VON BLOTTNITZ**

En la SudAfrika vilaĝo Port Alfred vi trovas en multaj stratoj grandlitere la averton: KPH/U (kiel sur la foto). Necesas ekspliko, ĉar Port Afred, situe apud la Hinda oceano, altiras multajn turistojn el Europo, kiuj veturas super tiuj signoj. Port Alfred situas en la provinco Orienta Kabo, kien ekde 1820 migris multaj Angloj. Tio estas unu el la plej postrestitaj regionoj de RSA laŭ kelkaj aspektoj.

La Metrika Sistemo (S.I.) estis plene legaligita en la Respubliko Sud-Afrika (RSA) en 1936, sed la loĝantaro neglektis ĝin kaj daŭrigis uzi la arkaikan anglan sistemon de mezuroj ĝis 1974, kiam ĝia uzu estis malpermesata. Ekde tiam sole la S.I. estis instruata en la lernejoj kaj eksklusive uzata sur ĉiuj terenoj. Tamen kelkaj angleparolantoj daŭre kontrauas ĝin en siaj koroj. Anstataŭ la korekta "km/h" ili skribadas "KPH" en kio la H signifas "hour". En la metrika sistemo kontraue, la h staras por la latina hora kiel simbolo kaj ne kiel mallongigo. Opiniante ke H estas mallongigo el la angla lingvo, ili sentas sin devigata pludoni ankaŭ la mallongigon por la Afrikansa "Uur". La signo KPH/U do konsistas el ioma parto de obstino kontraŭ la S.I. kaj el granda parto de stulteco, preskau analfabeteco.




***Supre:** Malkorekta skribaĵo sur vojo. Fotis la aŭtoro.*

La fikulpantoj ne estas nur la subedukitaj municipaj oficistoj, sed grave ankaŭ la Port Alfreda loĝantaro, kiu kaŝe ĝuas tion mokon kontraŭ la S.I., kaj do ne objetas.

Por informoj pri normoj:

[http://www.iso.org/iso/en/commcentre/isocafe/index.html](http://www.iso.org/iso/en/commcentre/isocafe/index.html)

# Dek kialoj por vojaĝi al Kaburbo

**Magali VON BLOTTNITZ**

La Kaburba sekcio de EASA (la Esperanto Asocio de Suda Afriko) varme invitas vin ĉiujn al Kaburbo venontjare je la fino de aprilo kaj komenco de majo. Certe vi pensas: nu bone, sed Kaburbo estas tro for. Tamen, estas (almenaŭ) 10 bonaj kialoj por ke vi faru tiun vojaĝon. Jen ili:

**BELECO!** Kaburbo (angle Cape Town) kaj la Kaba Regiono estas inter la plej belaj partoj de la mondo, kun nekredeble bela naturo, maro, montoj, sed ankaŭ historio-plena urbo, mondunika gastronomio kaj famaj vinoj, ktp.

**KLIMATO!** La klimato en aprilo/majo estas sufiĉe agrabla. Fakte, ĝi estas unu de la plej bonaj sezonoj por feriadi en Kaburbo, ĉar estas nek tro varme, nek tro vente, nek tro pluve.

**GASTEMO!** Atendas vin grupo da esperantistoj tre gastemaj kaj renkontemaj, kiuj volonte laŭ eblecoj gvidos vin tra la urbo / regiono kaj montros al vi la ejojn kiujn la kutimaj turistoj maltrafas…

**KONGRESO!** Inter la 27a de aprilo kaj 1a de majo okazos esperanto-kongreseto en la belega plaĝa urbo Muizenberg, kiu estos okazo por renkonti ne nur la lokajn kaburbajn esperantistojn, sed ankaŭ la aliajn partoprenontojn el Sudafriko, najbaraj landoj, aliaj afrikaj kaj espereble ankaŭ eŭropaj landoj.

**MULTLINGVECO!** La kongreso havos temajn prelegojn ekz. pri la temo de multlingveco en Afriko, kaj unu speciala vespero estos malfermata al (ne-esperantistaj) specialistoj de multlingveco, tiel ke vi havos aliron al plej grandaj spertoj en tiu kampo.

**DISTRO!** La kongreso ankaŭ enhavos distran programon, speciale kun ĉeplaĝaj ludoj / sporto kaj vizito al la pinguinoj.

**NATURO!** Oni ankaŭ povos viziti belajn muzeojn kaj naturparkon kie loĝas multaj birdoj kaj eĉ hipopotamoj. Profesia botanisto ofertos botanikan gvidadon tra la unika plantaro de la Kaba regiono.

**INFANOJ!** Se vi havas infanojn, ili estos bonvenaj kaj povos ludi kun la aliaj (lokaj) infanetoj kiuj ĉeestos la kongreson. Se ĉeestas sufiĉe da infanoj, ni provos organizi afrikan muzikan infan-teatraĵeton (estos surprizo!).

**UMADO!** Kompreneble la kongreso ankaŭ ofertos tempon por muzikumi, kanti, danci … kune kuiradi kaj manĝi, aŭ fari tion, kion vi deziros. (Proponoj estas bonvenaj).

**APOGO!** Se vi venas, vi helpos al afrikaj esperantistoj, kiuj tute ne povas pagi vojaĝon, sperti la veran sencon de esperanto. Tiamaniere vi vere helpos al esperanto en Afriko!

Do, ĝis baldaŭ kaj dissendu tiun mesaĝon al ĉiuj esperantistoj, kiujn vi konas. Ju pli ni estos, des pli sukcesa estos nia kongreso, kaj des pli bone fartos esperanto en Afriko!

Por pli da informoj kontaktu Magali von Blottnitz
retpoŝte: magali@xsinet.co.za
poŝte: 49 Balfour Road, Woodstock, 7925, Sudafriko
tel. +27 21 44 86 775, faks. +27 86 620 6052

**ANONCO**

# 3a Sudafrika Subkontinenta Kongreseto

***27a de aprilo – 1a de majo 2006, Muizenberg, Kaburbo***

## 1a Informilo kaj Aliĝilo

Somerfine, dum longa semajnfino, la kaburbaj esperantistoj invitos al kongreseto. La celo estas akompani la jarkunvenon de la Esperanto Asocio de Sudafriko (EASA) per kelktaga esperantlingva kunvivado al kiu laŭeble plej multaj membroj kaj gastoj (esperebLe ankaŭ eksterlandaj) povas vojaĝi. Lastaj tiaj kongresetoj okazis en 2002 (Durbano) kaj 2004 (Pretorio). Ni antaŭĝojas bonvenigi vin multnombre!

## La loko

Muizenberg estas historia kvartalo kaburba tuj apud la Falsa Bajo, konata por belaj plaĝoj kaj ĝenerale agrabla akvotemperaturo. La renkontiĝo okazos ĉefe en tendumejo, kie ankaŭ lueblas kabanoj kaj halo. Krom apudeco de plaĝo kaj lago, la kvartalo ankaŭ havas diversajn retoraciojn kaj gastumejojn. Por la kaburbanaj esperantistoj senveturilaj, tiu kvartalo ankaŭ estas trajne alirebla!

## La Datoj

La kongreseto okazos de ĵaudo la 27ª de Aprilo (Tago de Libereco) ĝis lundo la 1ª de Majo (Tago de Laboristoj).

## Ĉefaj programeroj

| | |
|---|---|
| Alveno | ĵaudo antaŭ- kaj postagmeze, laŭeblece |
| Bonveniga vespero | ĵaudo |
| Seminario por kursgvidantoj kaj instruistoj de Esperanto | 2-foje tage |
| Kun-kuirado: lernado de lingvaĵo receptara - | 1-2 foje tage |

| | |
|---|---|
| kuireja | |
| Ekskurso por vidi la Pingvinojn (plaĝo de rokoj) kaj por aĉeti fiŝon havene | vendredo antaŭtagmeze |
| Jarkunveno de EASA | vendredo postagmeze |
| Fiŝrostado kaj apudfajra kantado | vendredo vespere |
| Kulturaj atelieroj – preparado por la publika vespero | sabato |
| Publika vespero kun invito al aktivuloj el la multilingveca agadgrupo (MAG) | sabato vespere |
| Ekskurso al Rondevlei kun botanika kaj ornitologia gvidado kaj tagmeza rostfesto | dimanĉo |
| Adiaŭa vespero | dimanĉo vespere |
| Sporto kaj amuzado surplaĝe | lundo matene |
| Forvojaĝo / fino | lundo laŭbezone, fino tagmeze postmanĝe |

Se venas internaciaj gastoj, ni volonte klopodos organizi antaŭ- kaj postrenkontiĝajn eventojn, ekz. tranoktado sur la insulo de Rondevlei kun ebleco vidi la hipopotamojn.

## Kotizoj

A-membroj kaj internaciaj gastoj, loĝado en kabanoj: R750
B-membroj, loĝado en kabanoj: R270 (limigita al 5 lokoj)
A-membroj kaj internaciaj gastoj, tendumado: R400
B-membroj, tendumado: R200

Tiuj kotizoj inkludas ĉiujn manĝojn kaj la enirpagojn dum-ekskursajn.
Por oferto de programero haveblas rabato de R50 (maksimume dufoje po persono).
Por plenaj pagoj ricevitaj ĝis la 31ª de marto 2006 haveblas rabato de 10%.
Por tiuj, kiuj ŝatus tendumi sed ne havas propran, estos organizotaj tendoj.

La loka kongresa komitato konsistas el la jenaj personoj:
Harro von Blottnitz (estro) (hvb@chemeng.uct.ac.za), Benjamin Nyemya
Colin Beckford, Fred Berwyn-Taylor, Joseph Apasa, Magali von Blottnitz

## Aliĝilo

Se vi volas indiki intereson partopreni la kunvenon, bonvole plenumu tiun-ĉi aliĝilon kaj havigi ĝin al d-ro Harro von Blottnitz, aŭ permane, aŭ retpoŝte al hvb@chemeng.uct.ac.za, aŭ fakse al 086 620 6052 (el eksterlando +27 86 620 6052.)

**Nomo (antaŭnomo + familia nomo):**

..........................................................................................................

**Adreso:**

..........................................................................................................

..........................................................................................................

..........................................................................................................

..........................................................................................................

**Telefonnumero(j)**

..........................................................................................................

**Retadreso:**

..........................................................................................................

Bonvole indiku (per hoko) ĉu:

[ ] vi ŝatus havi pliajn informojn

[ ] vi loĝus kabane aŭ tendume (kaj se tendume, ĉu vi bezonus tendon)

[ ] vi volas jam nun antaŭmendi loĝlokon (por tio necesas antaŭpago de minimume triono de via kotizo, al la EASA kasisto – detalaj haveblas)

[ ] vi povus kontribui al la programo (kontraŭ rabato de R50); se jes, per kio?

[ ] vi havas aliajn demandojn aŭ proponojn.

# Anekdotojn

**Kompilis Johan KÖHLER**

La jenajn anekdotojn mi senhonte ŝtelis de la listo E-Anekdoto. Ilin do kontribuis (tamen, ne rekte) iu Rikardo – mi dankas ! (kaj pardonpetas se via humoro ne estas kia la mia)

## Kio estas en la centro de "amiko"?

Kruko demandas al Jozefino: Ŝajnas al mi ke vi ne plu ofte vidas vian amikinon Margo.
Jozefino: Vi pravas. Mi ĉesis vidi ŝin. Ŝi estas multe tro egocentra.
Kruko: Ĉu vere?
Jozefino: Jes. Ŝi interesiĝas pli multe pri si mem ol pri mi.

## Tio vi estas, kion vi digestas

Kruko flustras al Jozefino en restoracio: Kaŝrigardu la ulon en la apuda tablo. Li estas kanibalo.
Jozefino miras: Kiel vi povas scii tion?
Kruko: Li ĵus mendis la kelneron.

## Simpla demando

Kvar homoj estis demanditaj "kiom estas 2 plus 2".
Matematikisto diris, ke tio dependas de la nombra bazo.
Inĝeniero diris 4.
Statistikisto diris, ke li estis 95% certa, ke la

respondo estas
inter 3.99 kaj 4.01.
Politikisto diris "Kiom vi volus ĝin esti?"

### Kia flego per simpla sego!

Malkontenta patrino: Joĉjo, kie estas via frateto? Kaj kion vi faras per tiu segilo!?
Malica Joĉjo: Ĉu vi parolas pri mia... duonfrato?

## Idoj

Joĉjo ŝmace manĝas sian supon, kaj lia patrino ekskoldas.
Jozefino: Ho, vi manĝas kiel porkido! Vi scias kio estas porkido, ĉu ne?
Joĉjo: Jes, panjo. Porkido estas la filo de porkino.
La voĉo: Certe. Atendu sekundon...

# Vojaĝo al Londono

*Londono: Urbo kun miljara historio, kaj miloj da vidindaĵoj. Dank' al Esperanto kaj Pasporta Servo la aŭtoro povis vivi en tiu ĉi urbo...*

**Johan KÖHLER**

Tiuj, kiuj konas min scius, ke mi ludas en junulara blov-muzikistaro dum ĉirkaŭ dek jaroj. Dank' al tio, mi vizitis jam tri fojoj eksterlandon. La unua fojo estis Tajlando (precize Bankoko kaj Pattaya), la dua Aŭstrio (Vieno). En ambaŭ kazoj, mi klopodis Esperantumi, sed ne tre sukcese.

Antaŭ ol ni iris al Tajlando en la jaro 1999, mi korespondis kun Tajlanda Esperantisto, sed finfine ne povis renkonti lin pro la rigida? vojaĝplano de la grupo. Pro la sama kialo, mi ne povis vere turismumi – bedaŭrinde sed kompreneble

En Vieno oni donis al ni (speciale la pli-aĝuloj, tiam mi havis preskaŭ 21 jarojn) pli da libereco, kaj mi povis promeni en la urbo, kiam ni havis libertempo. Mi sukcesis (post longa serĉado) viziti la Esperanto Muzeo, kaj paroli iomete kun la fama sinjorino “Mag' Helga” Farukuoye. Bedaŭrinde mi ne tiam povis profiti el la fakto ke UK okazis en Kroatio, sufiĉe proksime de Aŭstrio. Ho, kia vojaĝo tio povus esti...

La tria, plej ĝisa fojo estis tiu ĉi jaro, kiam la orkestro rondvojaghis en Britio dum 10 tagoj. Dum la orkestrovojaĝo ni vizitis Leeds, la Kimruja urbeto Llangollen (pron. hlangohlen), kaj la urbo Cambridge. En Leeds ni ne turismumis. Sed buse, veturante de kaj al koncertoj (por spekti kaj ludi) estis okulfrapa la malnovstila arĥitekturo. Tio estas rimarkebla ankau en la aliaj urboj. De Leeds ni veturis tra bela pejzaĝo al Cloverley Hall proksime de la Kimruja landlimo. Mi miris pri la kunikloj en la herbaĵo, kaj bovinoj kiuj trankvile kaj kontente herkou. En Cambridge ni loĝis tri noktoj. Mirinda estis la etoso de la studenta urbo, kaj la nombro de bicikloj.



***Supre:** Big Ben, fotita de la aŭtoro.*

Estis en Londono kie mi havis plej multe da libertempo – ni tute ne havis koncertojn. Ni loĝis en loĝejo en la kvartalo Bayswater, proksime de Hyde Park kaj Nottinghill. Pro konstruado ĉe la plej proksima metrostacio ni devis uzi Nottinghill Gate, 10 minutoj for piede.

Kvankam kelkaj orkestranoj povis reste poste (kie mi), la plejmulto devis rapide turismumi. Unu grupeto vizitis preskaŭ ĉiuj vizitindaĵoj per buso, sed nur restis kelkaj minultoj je ĉiuj. Mi povis resti preskaŭ tuta tago ĉe unu muzeo ĉar mi ne necesis hast. Kun la geamikoj de la orkestro mi povis turismumi scante, ke mi povos poste eriri al loko se mi volus.

Kompreneble mi antaŭĝojis la vojaĝon kaj tuj kiam mi aŭdis pri la planoj mi aĉetis la libreton "Pasporta Servo". Dum mi atendis ĝian alvenon, la retejo de Pasporta Servo ebligis min rigardi, kie troviĝas esperantistoj. Mi konsideris vojaĝi ankaŭ al Irlando aŭ aliaj urboj proksime de Londono, do uzis la mapoj de la retejo. Kiam mi ricevis Pasporta Servo, mi povis rete kontakti gastigantojn. Mi elektis tri aŭ kvar adresoj, laŭ aĝo de la gastiganto, situo kaj nombro da tranoktoj.

Pro tio, ke estas Julio, kelkaj gastigantoj mem vojaĝis (ekz al UK). Aliaj jam havis gastojn. Mi tamen ricevis entuziasma respondo de iu Esperantisto. Li diris ke li estis komencanto, sed tio ne vere ĝenis min, ĉar mi scipvas la angla. Kaj, fakte, mi ne maltrafus senpagan loĝadon pro iom

da krokodilado!

Kelkaj semajnoj antaŭ mia foriro mi aĉetis gvidlibron de la eldonejo Lonely Planet pri la urbo Londono kaj mi ĝin pristudis, pensante pri vidindaĵoj kaj farendaĵoj. Pere de la mapoj en la gvidlibro mi ankaŭ povis konatiĝi kun la kvartaloj de la urboj antaŭ mia alveno – estis tre utila por akiri bazan scion pri la geografio de la urbo. Havi mapojn kiel parto de la gvidlibro mi forte rekomendas – estas multe pli facile marshi kun libro ol mapo, kaj mi povis facile pristudi la mapojn metroe aŭ buse.

Post la orkestro foriris, mi surbuse veturis al kvartalo proksima. Pro la bombado de metroo, e estis metrostacio proksime de mia nova loĝejo, sed ja estis busejo tre proksime. Kaj dum la postaj 7 tagoj mi dormis surplanke.

Matenmanĝoj mi kunportis el Sudafriko sed aliaj manĝaĵoj mi aĉetis en la arbo. Kvankam mi aĉetis en supermerkato kie eblas, mi trovas ke mi multe elspezis je manĝoj. Dum la orkestrovojaĝo ni volis fari lunĉojn, sed ofte troviĝis survoje dum lunĉo – do aĉetis manĝaĵo. Se vi vojaĝas, indas kunporti lunĉ-skatoleto plastika. Tiemaniere vi povas kunporti manĝaĵojn. Povas, sed verŝajne ne. Eble venontfoje. Do pro malbona organizado mi povas sugesti kelkaj bonaj manĝejoj – ĉefe la supermerkato Sainsbury's (kiel Spar en Sudafriko). Mi aĉetis 6 buletojn, viandon bonegan, kaj sufiĉe da “hummus” (saŭco de kikero kaj sezamo - bonegega) je ĉirkaŭ 2 pundoj. Aliaj bongustaj manĝaĵoj estas “fiŝo kaj fritaĵoj”, Ben & Jerry's glaciaĵo, Subway, kaj “steak & ale pie” en drinkejo loka (kun bona biero, kompreneble). Sed la plej bongusta manĝaĵo de la vojaĝo estis por mi tajkareo, kiun mi aĉetis dum mi promenis ĉe la Portabello merkato de “antikvaj varoj”. Bona sunbrila tago, promenante tute laŭvole, kun la bona odoro koiu memoras al alia bona vojaĝo... eble estis pli ol la manĝaĵo.

La transporta sistemo estas mirinda, kompare al la sudafrika sistemo, sed verŝajne ne pli bone ol aliaj eŭropaj urboj kiel Parizo aŭ Vieno. Ĉe ĉiu busejo oni indikas per mapo kiuj busoj tie haltas, por ke vi povas plani vojaĝon. Oni eĉ indikas elektronike kiam venonta buso alvenos!

Mi ne havis okazon renkonti multajn aliajn esperantistojn dum la vojaĝo.

En Cambridge mi dum kelkaj minutoj parolis kun du geesperantistoj, pensante ke mi ilin vizitos poste. En Londono mi maltrafis la monatan Esperanto-kunvenon pro aranĝoj ĉe-esti koncerto de Londona Simfoniorkestro. Tamen mi tie renkontis gefratojn Fantom[1] (Gavan kaj Petra) el Northampton. Gavan respondis al mia reta anonco pri mia vizito, kaj ni aranĝis rekonti ĉe la koncerto. Mi poste eksciis, ke ankaŭ Gavan ludas en blovmuzikistaro kiel mi, kaj mi ĉeestis koncerton de ili kiun hazarde okazos ne for de Londonurbo.

Nenia artikolo pri vojaĝo estus kompleta sen mencio de vidindaĵoj. Tamen, mi lasos al vi tion legi en gvidlibro. Mi preferas surpaperigi bonajn memorojn de mia vizito.

La unua estas la koncerto de LSO. Ke ĝi okazis dum mia restado en Londono estas rimarkinda. Ke oni ludis nur muzikon de John Williams (el filmoj Star Wars, Schindler's List, ET ktp.) estas tre speciala (tiama LSO originale surbendigis la verkojn). Ke estis senkosta estas nekredebla. Kaj ke mi ĝin ĉe-estis kun kelkaj orkestro-amikoj estas neforgesebla.

Alia fonto de memoroj kaj plej ŝatata loko en Londono estas Hyde Park, kie videblas sciurojn dum vesperiĝo, kie mi ŝtelaŭskultis R.E.M., kie perdis mi monujon (kie iu ĝin trovis kaj poŝtigis al mi), kaj kie mi ripozis dum promenoj. Mi memoras ankau pikniko en Green Park kun amikino, manĝante fromaĝon kaj fragojn proksime de Buckingham Palace, promenado apud la rivero Thames, vizito al muzeo Tate Modern kaj multaj aliaj okazoj. Nu, por vi ili povas esti ĉiutaga, sed ĉiu sperto havas sian fonon kaj signifon. Jen mi konstatis la valoron de Esperanto – ne nur ĝi donis al mi ŝanco esti en Londono meze de Julio – pintsezono - sed ankaŭ multajn bonajn memorojn.

---

1 *Fantom* estas bonkonata nomo en Esperantujo, kaj la gefratoj estas denaskuloj.

INTERRETO

# El Vikipedio

### Pri Palaco Buckingham

- Palaco Buckingham estas la oficiala Londona sidejo de la brita monarko.
- Origine konstruita por la Duko de Buckingham en 1703. La Reĝo Georgo la 3-a aĉetis la palacon en 1772 por la reĝa familio.
- Ekster la ĉefpordejo staras statuo de la Reĝino Viktorino (1819 – 1901), reĝino inter 1837 kaj 1901 .
- La nomo de la strato kiu kondukas al la palaco estas The Mall [de mol]. Aŭtoj estas tie malpermesataj dimanĉe.
- La palaco estas grava loko por ŝtatceremonioj kaj tie oni povas vidi la mondfaman ceremonion "ŝanĝado de la gvardioj".
- Membroj de la publiko nun rajtas viziti certajn ĉambrojn en la palaco.

*Fonto: Vikipedio (http://eo.wikipedia.org)*